

ĈEA-retkomunikoj 2/2006

CxEA-RETKOMUNIKOJ estas neregula informilo de Cxehxa Esperanto-Asocio por cxiuj rete atingeblaj CxEA-membroj, sed ankaux senpage sendata al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri Esperanto-movado en Cxehxio. Gxi neniam enhavas aldonajxojn. Se vi tamen ne deziras ricevadi ilin, sufcixas via mesagxo kun la teksto "Nesendadu" en la temlinio al <chrdle@kava-pech.cz> kaj ni tuj eligos vian retadreson el la dissendolisto.

ENHAVO

1. Grava korekto por Retkomunikoj 1/2006 - la dato de la GEA-kongreso
2. UK en Florenco frapas al la pordo
3. Aktualigita kalendaro de Esperanto-arangxo en Cxehxio
4. Novaj 2 lernolibroj de Esperanto jxus aperis
5. Cxehxa Esperanto-Junularo aktivas (regula rubriko)
6. Novajxo en la pagxaro de UEA
7. Lauxdinda propagando de Esperanto

1. GRAVA KOREKTO POR RETKOMUNIKOJ 1/2006!

En la 1-a n-ro de la cxi-jaraj Retkomunikoj okazis bedauxrinda eraro, pro kiu ni petas vian pardonon kaj precipe pardonon de la organizantoj de la jubilea GEA-kongreso: La gxusta dato de la jubilea kongreso de Germana Esperanto-Asocio estas 2006-06-02/05 kaj gxi okazos en la urbo Braunschweig. Pli da informoj vi povas trovi cxe <http://www.jubileagek.ic-herzberg.de>

2. UK EN FLORENCO FRAPAS AL LA PORDO

Ni atentigas eventualajn hezitatojn, ke post la 25-a de marto 2006 (ekde la 1-a de aprilo por tiuj, kiuj pagos rekte al la CO de UEA) denove konsiderinde altigxos la aligxkotizo por la Universala Kongresoen Florenco. Tial rekomendinde estas kiel eble plej frue decidi, aligxi kaj pagi. Pli da informoj cxe <chrdle@kava-pech.cz>. En la buskaravono (pro jamaj aligxoj de kelkaj germanoj dekomence internacia), kiu forveturos de Cxeske Budejovice, restas ankoraux liberaj lokoj. La buso forveturos 2006-07-28 vespere, la reveno 2006-08-06. La prezo estas 7 770,- Kč (ne inkluzivas la kongreskotizon!) Pli da informoj vi petu cxe Miroslava Tomečková <mtomeckova@kpmg.cz>.

3. AKTUALIGITA KALENDARO DE ESPERANTO-ARANGxOJ EN CxEHxIO:

SABLA PRINTEMPO en Písek, 2006-04-08, Renkontigxo arangxita de la loka E-klubo "La Ponto". Inf.: pavladvorakova@tiscali.cz

SEMAJNA LINGVA SEMINARIO EN SKOKOVY,

tradicia arangxo de Asocio de Esperantistoj-Handikapitoj, okazos printempe 2006-04-18/23 kaj auxtune 2006-10-16/22 en la pensiono Espero en la vilagxeto Skokovy (nord-orienta Bohemio). Pli da informoj sur: www.mlboleslav.cz/esperanto

ADONIDO (HLAVÁČEK) EN RATÍŠKOVICE - VRACOV, 2006-04-21/23.
Renkontigxo de amantoj de la naturo kaj bongusta vino.

Inf.: melicharkova@quick.cz

MAJA RENKONTIGxO DE LA CxEHxA IKUE-SEKCIO, 2006-05-13/14
en Příbyslav, omagxe al la elstara esperantisto Jan Filip, devenanta
el cxi tiu urbo kaj tie ankaux entombigita. Inf.: m.svacek@seznam.cz

TRADICIA RENKONTIGXO DE ESPERANTISTOJ EL CxEHxIO, POLLANDO KAJ
SLOVAKIO SUR LA PINTO DE CZANTORIA, 2006-06-18. Informoj:
suchanekj@seznam.cz

EKOTURISMA SEMINARIO (EKOTUR), 2006-07-01/08
en la urbeto Dobřichovice (apud Prago) kaj ties cxirkauxajxo. La
seminario invitas ekoturistojn - kaj biciklistojn kaj piedirantojn.
Ili iom konatigxos kun la montetaro cxirkaux Dobřichovice,
kun Bohemia Karsto kaj dum unu tago ili vizitos ankaux Pragon.
Informoj: www.kava-pech.cz/ekotur

LA 59-A KONGRESO DE INTERNACIA KATOLIKA UNUIGxO ESPERANTISTA (IKUE),
2006-07-08/15 en la grava pilgrimloko Velehrad (suda Moravio).
Informoj: www.ikue.org, aux: <m.svacek@seznam.cz>

SOMERA ESPERANTO-TENDARO (SET) en Lančov
estos organizata en tri etapoj: la 1-a: 2006-07-02/15, la 2-a: 2006-
07-16/29 kaj la 3-a: 2006-07-30/08-12. En cxiu etapo okazos ankaux
kurso de Esperanto. Informoj: podhradska@volny.cz

LA 28-A RENKONTIGxO DE ESPERANTAJ FAMILIOJ (REF),
2006-07-15/29 en Pilský Mlýn.
Eblas aligxi nur por unu semajno. Informoj: pavladvorakova@tiscali.cz

RENKONTIGXO DE EKS-TENDARANOJ (de SET), 2006-08-11/13
en SET Lančov. Informoj: podhradska@volny.cz

LA 56-A KONGRESO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA (KELI),
2006-08-12/19 en la vilagxo Strážné (la montaro Karkonosxo, nord-
orienta Bohemio). Informoj: cea.polnický@quick.cz

LA 11-A KONFERENCO DE CxEHxA ESPERANTO-ASOCIO,
2006-09-22/24, en la sudbohemia urbo České Budějovice. Dum la
konferenco estos spaco por la CxEA-sekcioj organizi tie propran
kunvenon. La unua sekcio, kiu uzis tiun eblon, estas Sekcio de
katolikoj. Informoj: jirka.tomecek@post.cz

INTERNACIA PAROLIGA SEMAJNO (InPaSem), 2006-10-02/08
en la urbeto Dobřichovice, en la pensio Sokol. Informoj kaj
aligxiloj: www.kava-pech.cz/inpasem aux info@kava-pech.cz

Fine de InPaSem 2006 okazos 2 paralelaj sendependaj okazajxoj:
EKZAMENOJ DE ILEI/UEA kaj EKUMENA DISERVO EN ESPERANTO.
Inf.: chrdle@kava-pech.cz

KONFERENCO APLIKO DE ESPERANTO EN SCIENCO KAJ TEKNIKO (KAEST), 2006-

11-10/12, en la urbeto Dobřichovice, pensiono Sokol. La temo A (cxefa) estas: Lingvo kaj Interreto, la temo B: Studoj el diversaj fakoj. Informoj: www.kava-pech.cz/kaest, aux: info@kava-pech.cz

LA 18-a KULTURA FESTIVALO en Ústí nad Labem, 2006-12-08/10, honore al la 100-a naskigxdatreveno de J. Kořínek kaj D-ro T. Pumpr. Informoj: www.esperanto.cz, m.smycka@seznam.cz

4. NOVAJ 2 LERNOLIBROJ DE ESPERANTO JxUS APERIS

Jxus aperis du novaj lernolibroj de Esperanto, ambaux cxe la eldonejo KAVA-PECH:

ESPERANTO POR INFANOJ 2 estas, same kiel la 1-a lernolibro "Esperanto pro děti", verkita de Jana Melichárková kaj ilustrita de Mirka Tomečková. Gxi estas rekomendinda dauxrigo por la infanoj, kiuj trastudis la unuan lernolibron. La lernolibro, krom la instruaj tekstoj estas kompletigita je pluraj mallongaj rakontoj kaj fabeloj, ke la infanoj povu praktike provi sian scion de la lingvo.

ESPERANTEM ZA TŘI MĚSÍCE de Petro Chrdle kaj Stanislava Chrdlová aperas jam en la 3-a eldono. Tamen, temas fakte pri nova libro, cxar gxi estas relaborita kaj kompletigita kompare kun la antauxaj eldonoj. La legolibro, kiu estas nedisigebla parto de la lernolibro, estas plene relaborita. Kompreneble, aktualigita estas ankaux la parto informanta pri la realajxoj de la Esperanta mondo kaj aldonitaj listo de internaciismoj kaj tabelo de mallongigoj ofte uzataj en Esperanto-tekstoj.

Specialan dankon kaj gratulon necesas esprimi al studento Petr Melichárek, kiu proprainiciate ellaboris al la lernolibro ekzercaron libere alireblan en la Interreto en tiel alta kvalito, ke la prikomputila gazeto "Computer" ne nur alte pritaksis gxin (4,5 steloj el 5 eblaj), sed gxi ecx rekomendis gxin tauxga ekzemplo por la ceteraj eldonejoj de lingvaj lernolibroj - vd.:

<http://www.kava-pech.cz/esperantemzatrimesice>

5. CxEHxA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

Cxehxa Esperanto-Junularo (CxEJ) okazigis interretan kunvenon, dum kiu oni unuafoje priparolis la organizajn detalojn de la internacia junulara renkontigxo, kiu okazu komence de julio en Velehrad, paralele kun la kongreso de IKUE.

La virtualan kunvenon cxeestis 6 junaj aktivuloj, inter ili ankaux unu juna gasto el Germanio.

La Praga klubo de CxEJ (<http://www.esperanto-praha.net>)

okazigis la 22-an de februaro sian unuan cxi-jaran kunvenon.

La klubo planas ekde marto denove okazigi la tradician kurson por junuloj "Esperanto cxe biero", sub gvidado de Tomáš BŘICHÁČEK kaj Dan MRÁZEK. Pragaj gejunuloj cxeestis ankaux la arangxon de grupo E-mentál en la praga ZOO, kaj la prezenton de Esperanto-libroj de eldonejo KAVA-PECH. Pasintan semajnfino, la vicprezidanto de CxEJ Marek BLAHUŠ cxeestis internacian arangxon Kreiva metiejo kun la temo "Stel(ar)o" en slovaka urbo Partizánske.

Por la gazeto Katolický týdeník li ankaux verkis recenzon pri la tria eldono de la libro Esperantem za tři měsíce, en kies legolibreto nove aperis interalie artikolo pri Granda Moravio, verkita de li kaj Dáša CHVÁTALOVÁ. Al la Internacia Junulara Kongreso (IJK) okazonta auxguste en Sarajevo en Bosnio kaj Hercegovino jam aligxis 3 cxehxaj gejunuloj.

Nuntempe estas en Cxehxio 46 registritaj membroj de CxEJ. Aktualajxoj kaj pliaj informoj pri cxehxa junularo cxiam troveblas cxe <http://www.esperanto.cz/cej>

6. NOVAJxOJ EN LA PAGxARO DE UEA

en UEA.ORG estas alireblaj multaj gravaj kaj interesaj informoj.

Hodiaux ni nomu almenaux du novajn:

a) katalogo de artikoloj el E-periodajxoj. Momente en gxi estas 3895 enskriboj pri artikoloj en 74 E-aj periodajxoj por pluraj jardekoj de la pasinta jarcento alirebla per

<http://uea.org/dokumentoj/artikoloj.php> aux pli simple per <http://esperanto.net/artikoloj/> El cxehxaj Esperanto-periodajxoj enestas tie artikoloj el Bohema Esperantisto kaj Bohema Revuo Esperantista, sed nek de Starto, nek de Sano aperinta gxis 1994. Rimarko: Iom pli ampleksa katalogo de artikoloj aperigitaj en Cxehxio, kiun komplilis Miroslav Malovec, trovigxas cxe <http://members.chello.cz/malovec/gazetoj.htm>

b) en UEA.ORG igxis elsxutebla la prelegaro de Internacia Kongresa Universitato, okazinta dum la Fortaleza UK en 2002. La prelegaro estas en la formato PDF, gxi troveblas per <http://uea.org/dokumentoj/> apud pluraj jam antauxe tie trovigxantaj, ekzemple IKU-libro 2005 (Vilno, Litovio) aux Aktoj de la Lingvopolitika Seminario dum la UK 1996 en Prago.

Certe do valoras iom krozi tra la pagxaro de UEA! Krom la menciitaj novajxoj vi trovos tie la plej ampleksan katalogon de E-libroj, kompaktdiskoj kaj ceteraj esperantajxoj, utilajn informojn pri Universalaj Kongresoj, kaj multajn aliajn indikojn.

7. LAUxDINDA PROPAGANDO DE ESPERANTO

Okaze de la 85-a naskigxdatreveno de s-ano Josef Novosad el Ostrov aperis en la monata revuo "Ostrovský měsíčník" tutpagxa artikolo pri Esperanto. La artikolo havas plejparte formon de intervuo de la cxefredaktorino kun s-ro Novosad. Temas pri la iniciato de s-ro Novosad, al kiu ni gratulas kaj al la naskigxdatreveno kaj al la inteligenta propagando de Esperanto.